



PROLETA VOĈO

OFICIALA ORGANO DE PROLET-ESPERANTISTA UNIO DE IBER-AMERIKAJ LANDOJ

II.^a Epoko
3.a (6) Jaro

BULTENO
Novembro - Decembro 1937

Redaktejo kaj sidejo:
Sección Esp.-ta. de A. E. P.: Kropotkine, 30 - Barcelona

Nro. 4 (40)

ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJN

Grava problemo nuna estas tiu, kiu prezentiĝas al lojalaj esperantistoj laboristaj, kaj ĝenerale al esperantistaro de Hispanio. Tio estas: La ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJN ĈU UNUGRAJAJ, ĈU SUPERAJ. La ĝisnuna farita laboro de hispana esperantistaro, kaj precipe tiu de nia proleta movado, estas laŭdinda, ĉar oni profitis ĉiujn okazojn por esperantigi aŭ komprenigi la altvaloran signifon kaj utilecon de lingvo internacia. Sed la movado progresadis iom post iom, ne tiel rapide kiel oni estus dezirinda.

Se iam ŝprucis el nia menso ideon pri kiom ni povus atingi instruante Esperanton ĉe la lernejoj, ni devis forpeli tiujn reveman penson, ĉar nia paŝo tiaflanke estis barita. La registaro kaj la malnovaj lernigaj formoj servis kiel barilon kaj nia laboro se ne haltiĝis, tamen ne progresadis. Foje kvazaŭ kaŝitaj dum malfavoraj cirkonstancoj, foje ne, oni klarigis Esperanton ĉe Societoj, Ateneoj, pli aŭ malpli laboristemaj, sed neniam ni povis trafe tuŝi la kernon de la problemo pri universala helpa lingvo. Nia interserkva laboro pasinta utilis, malgraŭ, por eltiri la atenton de parto el laborista klaso, kiu jam interesiĝas kaj akceptas la lingvon, kiel ligilon de internacia proletaro.

Sed nun la cirkonstancoj tute aliŝanĝiĝis kaj ni provu ĉu niaj penoj por la enkonduko de Esperanto en la Lernejojn fiaskos aŭ ne. Se ni sukcesas, tiam ni estos fieraj, ĉar la fruktoj, kiujn ni atingos estos ege utilaj por la kultura plibonigo kaj interrilateco de la Homaro.

Ni ja scias ke ĉe kapitalista sociordo la lingvo Esperanto ne povas plene sukcesi, konsekvence ni direktu rekte niajn paŝojn unue por helpi la nuligon de tiu ĉi perea sistemo, kiu malhelpas disvolvigi ĉiujn homajn ideojn; due labori por ke la morgaŭa socio --- pli homa kaj perfekta --- havu ĉion necesan por ĝia tutple-

na disvolviĝo. La finfina sukceso de Esperanto okazos ĉe socialista socio, sekve ni estas respondecaj se ni ne ofertas al estonta generacio ilon por universalaj rilatoj. Ni devas ligi Esperanton al tiuj, kiuj nun lernas novajn klerigajn trajtojn, okaze de socia kaj kultura disvolviĝo nunaj.

Ni estas respondecaj pri ilia internacia kulturo, komprenigante ke ili ne vivas nur ĉe iu ajn definitiva lando, sed ke ili vivas en la mondo. Plie, enirante al internacio, la knaboj, estontaj viroj, eĉ jam ne konos tiun malbonaĵon, kies nomo estas ŝovinismo. Ni celu ke tiuj knaboj, kiuj poste plenumos socian rolon en ilia postena laboro, havu pli ampleksajn klerigajn konojn ol antaŭe, per kiuj ili povu oferi al la Homaro altvaloran servon.

Laŭ tiu celo multaj intruistoj komencis tion fari en la lernejoj kie ili instruas. La provoj estis favoraj, taŭgaj, ĉar la instruistoj trafis vekoj la atenton de la infanoj pri tio, kio ne estis konata de ili. Per

Esperanto ili eltrovis novan mondon. Ĝis tiam, la knaboj, laŭ instrua vidpunkto, nur konis la etan lernejan mondon. Nu, ili scias eĉ la emojn de knaboj el ie ajn parto el la tero.

Fojon rakontis instruisto ke ne nur la plej kapablaj kaj lertaj infanoj kaj knaboj emociis korespondadas, sed ankaŭ tiuj malkleraj, kiuj faras ĝin ĝoje, forigante, senkonscie, sian malklerecon.

Tio estas ero el la tuto pri tio, kion ni kapablu fari. Ni klopodu por ke nia revo plenumiĝu. Sed pri tio estas necese ke ĉiuj proletaj esperantistoj grupiĝu en unu bloko por kanalogi, kune kun tiuj esperantistoj, kiuj deziras kaj sentas, la agadon por la Enkonduko de Esperanto en la Lernejojn.

Se ni tiel agas tre certe ni skribos belegan paĝon en la historio de esperanta movado, kiu utilis por la starigo de tutmonda lingvo.

F. S. MARTI

ŜTALA BARIERO

Neniam ia ajn armeo estis tiom amata de la popolo kiom la armeo de la lojala Hispanio.

Kontemplinte la luktojn k triomfojn de niaj batalantoj, la mondo ĉeestas grandiozan spektaklon, kiu ne havas antaŭan ekzemplon en Historio.

En tiu ĉi momento ni rememoras jenan frazon eldiritan de iu aŭstria generalo venkita de Napoleono: "Neeble estas batali kontraŭ li: tiu korsulo scias tute nenion pri strategio!" Ni prove dubas pri tio ĉu la grandaj generaloj perfidintaj Hispanion komprenas pri strategio ion pli ol niaj armeestroj. Sed certe estas ke l'Popola Armeo estas armeo hieraŭ naskiĝinta, armeo ne instruata per kazerneca dis-

ciplino, armeo kies estroj la plimulto ne vizitis la militajn akademiojn.

Forgita, organizita ĝi meze de l'terura batalo trabrulliganta Hispanion, la kontraŭfaŝista armeo konservas sian spiriton de popola armeo. El tia spirito konsistas ĝia forto, ĝia plej potenca armilo, la kialo pri ĝia nevenkebleco. Se vera estus tio ke l' mekanikigo de l'militaj procedoj nuligis la homan faktoron, la flagoj de Franko, Hitler k Mussolini flirtus jam nun super tuta Hispanio. Ili jetis kontraŭ la hispana popolo armeon mekanigitan kiel nenian ajn alian, ĉar eĉ ĝiaj soldatoj estas kvazaŭ ne konsciaj mortig-maŝinoj. Sed la humana spirita faktoro lhdas unuarangan rolon ĉe niaj frontoj k ĝi decidis la sorton de nia milito.

Kiuj defendas Hispanion kontraŭ la invadantaj badanĉoj estas — hondiŭ kiel hieraŭ—proletoj! Venis ili el la fabrikoj,

el la kampoj, el la minejoj, por iĝi soldatoj, tuj kiam la faŝismo ekkentreprenis sian agadon kontraŭ la sociaj konkeroj de l'laborularo. Kaj sur la batalkampoj ilin instigas la sama idealo, ilin gvidinte tra la sociaj baraktoj. En la tranĉeoj ili estas ankoraŭ homoj el iu klaso, kiu tra miljara sklavizado, tra laborego, mizero kaj suferoj akiris al si mem ŝtalan firmecon k' koro malfermitan al ĉiuj plej malavaraĵoj idealoj.

Proleta spirito instigante niajn batalantojn estas kvazaŭ la motoro de tiuj grandiozaj epopeoj, kiujn hodiaŭ la mondo emocije rigardas. La historiaj spertoj nin instruas tion ke la potencaj k' nevenkeblaj armeoj estis tiuj saturitaj de idealo profunde sentata. La spertoj de nia milito nin instruas pri tio ke la plej valoraj elementoj de l'Popola Armeo estas tiuj devenintaj el laborista mondo. Ju pli aŭtentika estas la proleta deveno de niaj batalantoj, ju pli konservas ili sian proletan animon, eĉ se ili okupas postenojn de granda respondeco en la stabo de nia nova armata korpuso, despli niaj batalantoj sin montras efikaj en la teknika laboro, en la rezistado k' en la atako.

Neniam armeo ia ajn estis tiom amata de l'popolo kiom estas tiu de l'kontraŭfaŝista Hispanio. Ĉar ĝi estas mem la popolo. Ĉar ĝi konsistas el la plej bona parto el la laborista amaso, kiu pere de l'armiloj servas hodiaŭ la saman aferon kiun ĝi servis hieraŭ pere de marteloj k' flugiloj. Ĉar ĝi estas la ŝtala barilo levita de l'hispana proletaro kontraŭ siaj klasaj malamlikoj.

Ĉar ĝi estas armeo de **PROLETOJ**.

El laborista gazeto tradukis J. OLEART

LENIN GVIDANTO DE L'PROLETOJ

Estus eraro opinii ke oktobra revolucio okazis spontane. Ĝi estis la aranĝado de grava revolucia puŝo de la laboristaj kaj kampanaraj amasoj sub la gvidado de bolŝevika Partio.

Ĝis la jaro 1861 ekzistis en Rusio la servantaro. Rusio estis kampanara lando. Malmulte disvolviganta estis la industrio, tial proletaro estis malforta kaj neorganizita. Laborista movado ekdisvolvigis la jarojn 1890-1900, kunigante tuj al internacia laborista movado. En okcidento proletara movado trairis jam grandan revolucionan spertadon, kies gvidantoj estis Marks kaj Engels, kiuj, per Materialisma Dialektiko, montris la rolon de proletaro en la revolucia movado. La plej revoluciemaj rusoj fariĝis tuj marksistoj, lernante, laŭ tiu vidpunkto, la revolucionan sperton kaj la tutan socian movadon. Tiu fakto helpis ilin deveni la veraj ĉefoj de la rusa proletara movado.

De la komenco Lenin fidis je laboristaro. Lenin ne estis nur vera teoriisto, sed ankaŭ bona organizanto, kiu sciis praktikigi la marksistajn konceptojn. Estas fakto ke la skismo inter bolŝevikoj kaj menŝevikoj dum la Kongreso de la jaro 1903, estis pro-organiza afero. Lenin faris gravan laboron favore al organizado de la movado. Li interesiĝis per kiu ajn okazintaĵo, atenteme aŭskultis tion, kion diris la laboristoj kaj kampanaroj kaj la soldatoj. Multnombraj verkaĵoj de Lenin estas dediĉitaj al organizaj aferoj, ĉar li sciis ke

la sukceso de proleta movado necesas sciencan kaj organizan laboron.

Lenin ne forgesis studi la antaŭajn sociajn movadojn. Je la lumo de tiu Granda Franca Revolucio, samkiel tiu de la jaro 1848 kaj la Pariza Komunio, li povis klare antaŭvidi la vojon por enkonduki la Sovetan Revolucion ĝis la Povo, prizorgante ĉiam la erarojn de tiuj antaŭaj Revolucioj, kaj la kialojn de iliaj fiaskoj. Lenin ŝage komprenis ke la gvidanta partio de proletaro nepre devas apogi sin je la amasoj.

Nur tiel Lenin povis altiri al la movado soldatojn, laboristojn kaj kampanarojn, aranĝi la movadon kontraŭ la reakcio, sukcesigante post akraj bataloj, la unuan organizitan laboristan Povon en la mondo.

N. KRUPSKAJA

KORESPONDADO

RICARDO RIBAS

Korespondadus pri ekskursaj temoj, interŝanĝante bildojn. Adreso: Ronda Tarrida del Mármol, 78, 3.^o 1.^a Barcelona.

JOSÉ ROQUERÍAS

Deziras korespondadi pri ĉiuj temoj, precipe kun junulino soveta.

Adreso: Grupo información Artillería, núm. 23. Comandancia Principal Artillería. HIJAR (Teruel).

En la baldaŭa numero ni publikos kompilon pri lastaj lingvaj studoj koncerne al afiksoj de esperanta lingvo.

ESTUDIOS SOBRE MATERIALISMO HISTÓRICO

LA SOCIEDAD

La sociedad es el sistema más amplio de relaciones recíprocas que al mismo tiempo incluyen todas las más variadas acciones entre las personas.

Podemos también definir la Sociedad como un sistema de relaciones mutuas, desestimando de una manera categórica todos los intentos de la llamada escuela orgánica, tendientes a comparar la sociedad a un organismo.

El sentido social de la teoría orgánica es el siguiente: La clase dominante es la cabeza; los trabajadores o esclavos son los brazos y las piernas, y puesto que los brazos y las piernas no pueden en la naturaleza reemplazar la cabeza, los subordinados deben mantenerse en paz.

No obstante, creemos que no es suficiente decir que la sociedad es un sistema de personas que se influyen mutuamente o bien que este sistema tiene un carácter permanente. Es necesario explicar la na-

turalidad de este sistema, y cómo se le puede distinguir de los demás, lo que constituye su base vital y su condición necesaria de equilibrio.

CARACTER DEL VINCULO SOCIAL

Las relaciones entre las personas que constituyen el fenómeno social son variadas. Es necesario saber cuál es la condición necesaria de la permanencia de estas relaciones. ¿Dónde está la condición esencial de equilibrio para el sistema total? ¿Cuál es el tipo básico de vínculo social, sin el cual no podríamos comprender el sistema?

La respuesta nos dirá que es el trabajo la relación social básica, expresado en forma de *trabajo social*; es el trabajo consciente o inconsciente realizado por una persona en provecho de otra. Supongamos que la relación de trabajo entre personas fuese destruido; que los produc-

tos (mercancías) no pudiesen ser trasladados de un sitio a otro; que las personas no trabajasen las unas para las otras; que el trabajo social perdiera su carácter. ¿Cuál sería el resultado? Este sería la ruina de la sociedad. El vínculo del trabajo, pues, es la condición fundamental para la posibilidad de un equilibrio interno en el sistema de la sociedad humana.

De las relaciones entre el medio y el sistema depende todo un último término. La sociedad humana no existe en el vacío, sino que está rodeada de un "medio ambiente".

Es evidente que si la sociedad humana no está adaptada a su medio no perderá. Todas las manifestaciones vitales de la sociedad quedarán reducidas a la nada. La vida de la sociedad depende de la relación entre la sociedad y la Naturaleza. Es el trabajo lo que más evidente expresa el vínculo social y, por consiguiente, la relación entre los hombres y la Naturaleza. El trabajo es el modo de contacto entre la sociedad y la Naturaleza. Mediante el trabajo, la energía se transfiere de la Naturaleza a la sociedad; y es de esta energía que la sociedad vive y se desarro-

JUNULARA VIVO

La tridekunuan de pasinta Oktobro, okazis rememora kunveno al niaj esperantistoj falintaj luktante kontraŭ la faŝismo. Ĝi estis organizita de nia "Junularo". La salono de Ateneo Popular de Gracia kunigis multnombrajn amason, inter kia oni povis vidi esperantistojn el la diversaj esperantorganizaĵoj el Barcelono.

Malfermis la kunvenon kamarado Suriñach je la nomo de la "Junularo de Puil" per trafa parolado. Li bone rimarkigis tion, kio estas tiu juna organizaĵo fila de Puil, kiaj estas ĝiaj celoj kaj klopodoj. Ankaŭ temis pri la Puil-anaj esperantistoj, kiuj jam ne estas inter ni, reliefigante ke ilia ago kiel ĉia revolucia ofero ne povas resti senfruktodoni, ĉar la ne sukcesanta Pariza Komunumo estis spertado, necesa kiu plene taŭgis por triumfigi Rusan Revolucion, samkiel la hispana oktobro pretigis al revolucia proletaro por faskigi la faŝistajn intencojn. Por prezenti en tiu kunveno, li diris, oni elektis tragikan heroan epizodon, kiu taŭge montras la heroecon de l'komunanoj. Per ĝi ni povas iom kapabliĝi pro la grandioza heroecon de niaj mortintoj.

Sekve al tiuj vortoj oni ludis la menciitan unuaktan epizodon "Versaja Kaptito" esperante. La ludantoj elparolis kaj ludis bonege. Tio estis plia pruvo de l'konsisteco de nia kara lingvo. La ĉeestantoj aprobis spontane kaj fervore pli ol foje. Ankaŭ la duakta komedio en kataluna lingvo "Gent d'Ara" atingis plenan sukceson. Tiaj, kiuj ĝin ebligis estis la partoprenantoj; tiel bone ili ludis! Finfine kel-

kaj kamaradoj deklamis poeziojn inter kiuj estis ĝentilaj ge-kunlaborantoj simpatiantaj al esperanto; poste k-do Güell dankis al ĉeestantoj ilian helpon pri la sukceso de tiu rememora kunveno, kaj diris ke "Junularo de PUIL" esperas ke tiu helpo estos al ĝi en ĉiu por esperanta-okazigo.

ĈEESTANTO

LA JARKOTIZO DE PUIL ESTAS TRI PESETOJ JARE PLUS UNU PESETO POR LA MEMBROKARTO

MIA PATRIO

Se oni min demandus
kie troviĝas mia patrio,
per gesto energia
al oni mi montrus
al la Mondo.

Landlimojn neniajn
havas mia patrio,
senlandlime ĝi kuŝas
de la norda ĝis la suda polusoj,
de la lumplena okcidento
ĝis la mistera oriento.

K ĝin uzurpe ne regas
mandarenoj stultaj,
emfazaj pupoj-reĝoj,
nek papo adulta.

Senlandlima k libera
estas mia patrio,
mia patrio
ESPERANTIO.

PARIO

la. El trabajo representa la adaptación activa de los hombres a la Naturaleza.

La anatomía de la sociedad es preciso buscarla en su economía, o sea, en las relaciones de trabajo.

LA SOCIEDAD Y EL INDIVIDUO

Una cosa que nadie pone en duda es que la sociedad está compuesta de individuos; si éstos no existieran no habría sociedad. Pero la sociedad no es una simple agrupación de personas. La sociedad es un agregado real (1), un "sistema" muy complicado de relaciones mutuas entre diferentes personas. Eso significa que la sociedad, en conjunto, es algo más que la suma de sus partes.

Desmontemos una máquina, por ejemplo, y coloquemos sus partes en un montón. Así agruparemos la suma de los elementos suficientes y necesarios de la máquina, pero que no será la máquina, ya que a la suma de elementos les falta una relación definida, de un vínculo funcional que hace de las partes un mecanismo determinado. ¿Qué es lo que transforma es-

tas partes en un conjunto? Es precisamente su particular disposición. El mismo caso es aplicado a la sociedad, la cual está integrada por individuos, pero si éstos no están en sus puestos en el proceso del trabajo, la sociedad no podrá tener una existencia real.

La vida ideológica de la sociedad tampoco es una suma de ideales y sentimientos de los individuos que la componen, sino que es el producto de su asociación recíproca; es algo que no puede ser reducido a una sencilla suma aritmética. Es un elemento que forma parte de la vida social, resultante de las relaciones entre los hombres.

El individuo en la sociedad juega un papel; sus acciones, sentimientos y voliciones, por mínimos que sean, entran a formar parte de los fenómenos sociales. El fenómeno social es un resultado, una consecuencia de las relaciones recíprocas entre los individuos.

Si examinamos cada individuo en su desarrollo veremos, que en el fondo, está lleno de influencias de su *medio ambiente*. El hombre recibe la influencia de la familia, de la calle, de la escuela; habla un

EL LA REDAKCIO

Torvid Edvardsen. Mosjoen. — Norvegio. — Ni bonakceptis vian deziron aboni vin al nia gazeto. La plej trafa facileco estas sendi respondkuponojn. Estis sendita al vi la 39an numeron. Laŭpove ni plenumos vian peton koncerne al esperanta materialo por via ekspozicio.

Partulec Paŭlo. Stonava. — Ĉeĥoslovakio. — Tre certe vi ricevos ĉiujn aperantajn numerojn de P. V. Rilate al abonkondiĉoj estas po tri numeroj du respondkuponoj.

José Alzamora, Alicante. — Vian peton ni tuj plenumis. Tial ni sendis plenan kolekton de P. V. krom gramatikon, kiun ni delonge uzas por ĉiuj kursoj elementalaj. Ĝis nun per ĝi ni atingis bonajn sukcesojn. La prezo po ĉiu numero estas 0'30 ptoj. por la hispananoj. Bonvolu informi nin pri esperanta movado en via urbo.

lenguaje que es producto de la evolución social; tiene pensamientos que han sido desarrollados por generaciones precedentes; todo eso contribuye a la formación del individuo. Dentro de cada individuo hay un contenido social. El individuo mismo es el resultado de una interna condensación de influencia social.

LA NATURALEZA COMO MEDIO DE LA SOCIEDAD

La sociedad humana es inconcebible sin un *medio ambiente*. La Naturaleza es la fuente de las materias alimenticias de la sociedad humana y por eso determina las condiciones de vida. Es incorrecto considerar a la Naturaleza desde el punto de vista teológico. El hombre no es el señor de la creación y que todo está hecho para satisfacer sus necesidades.

En realidad, la Naturaleza cae a menudo sobre el *señor de la creación* de una manera tan salvaje que éste se ve obligado a admitir su superioridad. Muchos siglos de trabajo han costado al hombre para localizar en algunos aspectos a la Naturaleza.

El Progreso es precisamente el avance que el hombre obtiene de la Naturaleza durante el proceso de su lucha titánica.

El hombre, la sociedad humana, desde sus principios, ha extraído energía material del mundo exterior. La sociedad se adapta tanto más a la Naturaleza, cuanto más energía extrae (y asimila) de ella. Solamente por esta cantidad de energía la sociedad puede tener éxito en su crecimiento.

SCIENCEMA

(1) Se comprende por agregado real el conjunto de cosas materiales de la Sociedad.

NUR MIZERULO

Knabo, kurante tra strato, trovis maljunulon malriĉe vestita kaj mizeraspekta, kiu petis al li, se volonte li helpos lin trapasi straton al placo. La knabo tuj akceptis kaj kuniris kun la humila homo.

La homo tre afable parolis, knabeto bone respondis kaj ili baldaŭ iĝis tute amikoj.

Estis Armando la nomo de l'knabeto. Tiu de homo estis Arto.—Strangan nomon uzis la homo!—Armando demandis al mizerulo: Kial vi uzas tian belsonan nomon! Ho! ve! estis la sopira—respondo, ĉar iluzioj ĉiam estas belsonaj.

Jen plej ne natura respondo, mi pripensigos vin. — Iru ni al tiu benko, tie ni sidos kaj mi rakontos iom pri mia revanta nomo.

Post sidiĝi sur benko, ĉe la suno, do ĝi estis malvarman novembran monaton, malriĉa tremanta homo, post fermi momento la okulojn kvazaŭ volus kunigi rememorojn, komencis rakonti...

Iun tagon matene, sunradioj lumigis vilaĝon kie mi loĝis ĝis kiam mi estis dek kvar jaraĝa, mi, kun tornistro mangaj plena kaj kelkaj moneroj en poŝo, estis foririnta el hejmo kie ĝis tiam mi nek vivis nek malvivis. Mi intencis venki la vivon.—Kion mi kredis pri ĝi?, nur hodiaŭ mi scias tion, kio estas la vivo.

Pro miaj pensoj, pro miaj venkaj ideoj la samvilaĝanoj baptis min je ARTO ĉar mia plej amata revo estis ja iĝi fama artisto, fama aktoro aŭ fama pentristo, ktp. Mi ĝoje ricevis kaj mi alproprigi tiun nomon: ARTO!—Kiom da iluzioj, kiom da vizioj en nura vorto!

Pro tiu belhorizonto, kiom mi prezentis min, mi fuĝadis el malgranda mizera vilaĝo. Ĉe la modernaj urboj estis kie mi pensis plenumi mian revon.

Ĉu eble enuigas al vi ĉi novelan rakonton, Armando?—Ne, ne enuigas al mi, diris Armando. Daŭrigu vian interesplenan rilaton.—La malriĉulo reveme daŭrigis... Mi alvenis en grandan urbon, Barcelonon!—Barcelonon!, nur ĵus en ĝi alveni jam ŝajnis min ŝtupo venkita el la glora stuparo. Maltrafe mi agis. Senlabora, sanfamilla, kaj senamika persono mia volo estis venki ion, kion ĝenerale ne venkas instruitaj riĉfroj, edukitaj bienhavantoj, sed miaj revoj daŭrigis malgraŭ la tieaj reslajoj.

Sekve al kelkaj laciĝantaj tagoj ke mi jam vagadis tra Barcelono serĉante laborokupon, finfine pentristo pli burĝa ol arta, dungis min... kia ĝojo tiam mi sentis. La mastro diris kaj rediris min ke mi profite estis lernante pentristan arton. Mi tuj nur

ekpripensis vojaĝon al Parizo, patrio laŭ la inteligentuloj de l'artistoj.—Fervore mi kolektis monon, eĉ la dimanĉojn, por ĝui, por amuziĝo mi elspezis nek centimon.

La tempo pasis. Fariĝis amikoj mi kaj laborkunulo. Li (la kunulo) estis tre diboĉema kaj terurege ne pripensema. Ja mi neniel atentis pri liaj malvirtoj, kaj mi, kiu ĝis tiam trinkis nur akvon, ekstrinkis vinon pli kaj pli.—Jen vivo de l'granda kaj alloga urbo. Fiinoj, likvoroj, malvirtemaj plezuroj, ĉiajn frenezulaĵojn ni faris.

Malgraŭ vivi tiamaniere, iom post iom la konscienco riproĉis min kaj mi intencis refari mian preskaŭ detruitan vivon.

Denove mi kolektis monon aktive kaj forlasis la kumulon, kiu tiom malbone enkondukis min al malvirta vojo.

Post la kolektado de tricent pesetoj, ni aĉetis vojaĝan bileton kaj per vagonaro mi flugis Francion.—Jen estas mia subteno momenta; tricent pesetoj, pluraj materialaj konsilioj je la eksmastro kaj juneca revaro.—Fajfado anoncis min ke la vagonaro ekmarŝadis. Sola, tamen kune kun arto da iluzioj mi estis sidanta vagonbenko kaj post diversaj minutoj trafenestre mi ekvidis senĉese pejzaĝojn, belajn pejzaĝojn!

Nenian stacidomon mi vizitis dum la daŭro de l'vojaĝo ĉar tiele ŝajnis min ke pli rapide mi alvenus tien, kie mi volus jam esti. Preskaŭ mi ne atentis pri la urboj kaj vilaĝoj eĉ ne ekzistis landlimoj por mi kvazaŭ mi estus mondmastro.

Post dudekkvin vojaĝhoroj pli malpli, mi ekvidis Parizon, emociita mi restis preskaŭ senspirado kaj ĉe la elirejo el la bela stacidomo de Parizo ĉarma, pli iluzie kaj firme mi spiris kaj kredis sukcese.

Dum ses aŭ ok jaroj mi vivis nur por artafero. Miaj pentraĵoj ekfamiĝis. Ĉe la

inteligentaj artaj cirkloj mi estis en ĉiuj lipo, en ĉiuj diskutoj, eĉ disputoj. Jen tiel oni temis... Ĉu mi pli bone kaj arte pentradis ol la nuntempaj pentristoj famaj... Ĉu miaj pentraĵoj estis nova artblovado...

Je tiuj ĉi vortoj la maljunulo sekigis larmojn de siaj velkintaj lacaj okuloj kaj ĉirkaŭrigardinte malgaje emocia ekparolis denove... Nu, tiam mi estis dudekok jaraĝa, fama, juna kaj riĉa; laŭdemaj sinjoroj ĉirkaŭantaj ferigis min, unuj pro mia famo kaj influo venis apud mi, aliaj pro mia sindonema karaktero..., pluraj ja nur por maŝi flanke de famulo al kiu sinjoro hazardo riĉigis karesante samtempe lian junan personon.

Pro esti monhavanto, pro mia malvirtemo kie ĉe Barcelono komencis nuligi min por la vivbatalo, pro manko de ĝusta konscio socia, baldaŭ eniris mi tra malvirtema kaj diboĉema ĝuado. Alifoje fiinoj, likvoroj, vinoj eĉ ĥemiaj artifikplezuroj.

Eble se mi estus enamiĝinta de ia sincera virino mi ne vagadus en tioma fivojo. Plej drinkemulo estis mi, plej fiinemulo kaj argenta disdonacanto ankaŭ estis mi. Neniel mi bone kaj arte plu pentris. Mia arto malaperis kaj mi rulis senhalte tra rulanta vivo per kiu homo iĝas besto, per kiu homo nur vivas por murdaj plezuroj.

Sen mono, miaj geamikoj eksigis pro natura memvolo. Senfrukte mi serĉis mallaboremajn kaj malhonorajn monhelpojn, tio estas, mi restis tute sola mizere sed kune kun miaj plezuraj rememoroj kaj mia nomo, kiom mi nune ankoraŭ uzas por ne forgesi mian trairadon tra la mondon.—Post elproprigita per plezuroj, per malvirtoj mi foriris el Francio por ne plu vidi scenejon pro kiuj mi detruis mian arton kaj vivon.

Pli kaj pli al mi estis iĝinta malamema vivado komuna kun la homoj, tial mi miĝas tra landoj, tra montoj parolante al neniuj, nur por trapasi straton estis kiel mi petis helpo al vi, vi tuj rememorigis min infanan feliĉan tempon... —Ekrigardante subite kiel la infano aspektis, la parolanto diris misgaje. —Simpatia Armando ne malgajiĝu sed cerbumo ke mi pro l' malvirtoj, pro individuaj avaraj ĝuemoj kaj pro ruzaj monkaptantoj de kapitalista socia moralo, restis kvazaŭ sovaĝa mizerulo...

Senvorta, muta, laŭŝajne ensorĉita, restis Armando sidante sur benko dum Arto marŝis en elurba vojo. Historio de tiu malsorta viro, kiu jam ne ekvidis en malproksimo plorigis lin, li intencis enkuri sed komprenis ke detruitan vivon oni ne povas savi.

SALVADIEGO

**GRAMÁTICA
DE P. U. I. L.**



PARA
CURSOS
ELEMENTALES

Precio: 1 pta.

PEDIDOS a:
Sección Esp.-la. del A. E. P.
Kropotkine, 30-32 - BARCELONA